

### PLU RENOVIGAS LA RETAJ RENKONTIĜOJ


La situacio de pandemio firmigis la okazigon de retaj renkontiĝoj en la tuta mondo.

En tiu ĉi monato aprilo brilos la renkontiĝo organizata de Tutmonda Esperantista Junulara organizo (TEJO), nomata **Retoso**. Ĝi okazos inter la 2a kaj la 5a de aprilo. Ĝi donos al la homoj la eblon amuziĝi, lerni kaj renkontiĝi kun (novaj) amikoj en Esperantujo per interreto. Vizitu la retejon <https://retoso2021.tejo.org/> por koni ĉiujn detalojn.

El Madrido ni daŭrigas la monatajn virtualajn renkontiĝojn. En aprilo, pro la paskaj festoj, la venonta okazos la duan sabaton, la 10an de aprilo. La horo estas la sama, la 18,00 (centroeŭropa tempo) kaj la loko estos la sama kutima adreso en la retejo Jitsi: <https://meet.jit.si/MadridaSabataRenkonto>.

Memoru ke niaj babilejoj estas malferma por iu ajn esperantisto, komencanto aŭ progresinto, madridano aŭ loĝanto en alia loko.

En la marta evento ni ĝuis debaton, pri la temo “Ĉu nefikcio povas esti literaturo?”, kiun gvidis Toño del Barrio. Jen foto de momento de la okazaĵo.



### FUENLABRADA ESPERANTO-LIGO KUNVENIS FIZIKE

Dume, Fuenlabrada Esperanto-Ligo celebris la 10an de marto sian jaran membro-kunsidon, kun fizika ĉeesto de kvin membroj kaj kelkaj reprezentitaj. Jes, oni kunvenis fizike en la sidejo de la asocio, uzante la tre taŭgan korton, kiu estas parto de la domo kaj permesas sidi je libera aero en sekuraj kondiĉoj.

En ĝia retejo <http://www.esperanto.es/fel/> aperis jam la unua ĉapitro de aŭda kurso nun konstruata, bazita sur Gerda malaperis, de Claude Piron. Baldaŭ aperos la sekvaj ĉapitroj.

Se vi deziras kontakti ĉi tiun asocion, skribu al [fuenlabrada.esperanto.ligo@gmail.com](mailto:fuenlabrada.esperanto.ligo@gmail.com).

## madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

<http://www.esperanto.es/mel/>

[madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es)

Redaktas Toño del Barrio

Komentoj kaj informoj sendu al [niavocho@gmail.com](mailto:niavocho@gmail.com)

**VIRTUALA KURSO POR HISPANLINGVANOJ**

Baldaŭ okazos dua eldono de tre sukcesa iniciato, jam provita en pasinta somero: la virtuala kurso por hispanlingvanoj sub gvido de instruistoj, organizata de Kolombia Esperanto-Ligo (KEL). La pasinta kurso tre sukcesis ĉefe en Ameriko, kaj nun venos nova ŝanco.

Hispana Esperanto-Federacio decidis kunlabori organize kaj finance en la kurso. Unu el la horaroj estos taŭga por lernantoj en Hispanio.

La kurso estas senpaga por la lernantoj. La instruistoj ricevos etan kompenson, danke al la helpo de HEF, UEA kaj TEJO. Do, bv diskonigi inter viaj amikoj kaj konatoj, kaj ankaŭ kontakti kun HEF kaze ke vi povas kontribui en la instruado.

Pliajn detalojn (baldaŭ ĝisdatigotajn) eblas jam trovi en: <https://esperanto.co/cursos/c21/>.

**NOVA RETPOŝTADRESO KAJ LIMDATO POR LA BELARTAJ KONKURSOJ**

Lastnovembre Universala Esperanto-Asocio alvokis al partopreno en la 72-a okazigo de la Belartaj Konkursoj de UEA, en 2021. Pri ĝi ni informis en la ekzemplero de "Nia Voĉo" de januaro 2021.

Tamen, pro teknikaj problemoj, bedaŭrinde ne eblas nuntempe aliro al la antaŭe indikita retpoŝtadreso [sciosfero@gmail.com](mailto:sciosfero@gmail.com). Dum teamo provas solvi la alirproblemon, UEA petas ĉiujn kandidatojn sendi siajn konkursajn proponojn (aŭ resendi, en la kazo ke ili jam sendis ilin kaj ilia ricevo ne estis tuj konfirmita) al la nova retpoŝtadreso [bk@co.uea.org](mailto:bk@co.uea.org) (kopie al la provizora adreso [belartajkonkursoj@gmail.com](mailto:belartajkonkursoj@gmail.com)).

Por ne malhelpi kandidatojn, la limdato por akcepto de proponoj estas prokrastita ĝis la 30-a de aprilo 2021. Ĉiuj detaloj pri partopren-reguloj kaj premioj troveblas en la Gazetara Komunikado N-ro 915 de UEA ĉe: [uea.org/gk/937a1](http://uea.org/gk/937a1).

**KURSO DE MONDA ORGANIZAĴO PRI SANO EN ESPERANTO**

Monda Organizaĵo pri Sanoj de Unuiĝintaj Nacioj (MOS) anoncis la pretigadon de reta kurso "Enkonduko pri KOVIM-19: metodoj por detekto, prevento, reago kaj kontrolo", tradukita al Esperanto en kunlaboro kun la asocio de medicinistoj UMEA kaj UEA.

La adreso estas: <https://openwho.org/courses/enkonduko-al-KOVIM-19>.

La kurso donas ĝeneralan enkondukon pri KOVIM-19 kaj novaperantaj spirvirusoj. Ĝi celas profesiulojn pri publika sano, administrantojn de okazaĵoj kaj homojn kiuj laboras por Unuiĝintaj Nacioj, internaciaj organizaĵoj, NRO-j kaj iu ajn persono kiu interesiĝas pri la temo.

La lerncelo estas: priskribi la fundamentajn principojn de novaperantaj spiraj virusoj kaj kiel efike reagi al eksplodo, kaj la kursodaŭro: ĉirkaŭ 3 horoj. Atestilo de sukceso estos havebla por partoprenantoj, kiuj akiris almenaŭ 80% de ĉiuj poentoj disponeblaj tra ĉiuj testoj.

**POR PLIAJ INFORMOJ**

Memoru ke Madrida Esperanto-Liceo malfermis konton en la socia retejo Tŭitero (Twitter). Vi povas trovi nin ĉe: <https://twitter.com/LiceoMadrida>. Sekvu kaj abonu ĝin por scii pli pri niaj agadoj kaj renkontoj.

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, kaj la retliston [https://groups.google.com/g/esperanto\\_madrid/](https://groups.google.com/g/esperanto_madrid/).

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: <https://www.facebook.com/esperanto.madrid/> aŭ la pli ĝenerala <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

[madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es)



Redaktas Toño del Barrio

Komentoj kaj informojn sendu al [niavocho@gmail.com](mailto:niavocho@gmail.com)

**nia voĉo**

**aprilo 2021**

Por informiĝi pri aliaj tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon <https://eventaservo.org/>.

**madrida esperanto-liceo**

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

[madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es)



Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al [niavocho@gmail.com](mailto:niavocho@gmail.com)